ANTO
e Corbéra
(XIIe)

2-a Jaro, N-o 18 (70) — APERAS S.A.T. SEMAJNE — 28. Januaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

GERMANA INDUSTRIO — ELMIGRADO

Dum la lasta jardeko okazis grava alilokigo de l' germana industrio. Por pli-altigi la eksporton kaj pli malmultekostigi la produktojn estas translokitaj la produktejoj el la landinterno al la marbordo aŭ en regionojn, kie troviĝas krudmaterialo, aŭ ĝi povas esti transportata per malmultekosta akva vojo.

Depost kelka tempo ni observas translokigon de industrientreprenoj al aliaj eŭropaj ŝtatoj aŭ eĉ al transmaraj. Tio ege gravas por la germana popolekonomio, ĉar temas ĉefe pri ekonomibranĉoj, kiuj produktas eksportajojn, pro tio estas sendependaj de eksterlandaj krudmaterialoj. Estas konsiderataj antaŭ ĉio la maŝinindustrio, la aerŝipkonstruado, la mekanika industrio, la farboproduktado, la kemia kaj teksindustrioj. Pro la sendependeco rilate al krudmaterialo ĉi branĉoj povas esti aranĝataj en tiuj landoj, kie la konsumo estas favora.

Por la elmigrado ekzistas multaj kaŭzoj. Ofte sufiĉas la ekkono de pli favoraj produktkondiĉoj en alia lando por ĉesi la produktadon en Germanio. Ankaŭ la importimposto de aliaj landoj por ĉi produktoj kaŭzis la uzinan translokiĝon. Ke la fugo al eksterlando estas entreprenita por eviti pagon de altaj impostoj kiuj ŝarĝas la industrion, ne konfesas la industriistoj.

Precipe Usono kaj Sud-Ameriko, Argentino kaj Brazilio allogas la germanajn entreprenojn. Ĝenerale ne estis translokitaj la malnovaj instaloj, en la plej oftaj kazoj estis transdonitaj la produktado al novaj eksterlandaj entreprenoj, je kiuj estas interesataj la devenentrepreno per kapitala aŭ persona interligo.



Kio migris al eksterlando, estis spertoj, patentoj, uzinkapitalo, kaj parto de komerca kaj teknika oficistaro, de lastaj kompreneble la plej bonaj. Kio rilatas al maŝinoj por la nova entrepreno — ili estis liverataj el Germanio — se ili ne estis haveblaj pli malmultekoste en la koncerna lando.

Ĉi faktoj signifas klare la malprofiton por la germana popolekonomio. La tiom necesega egaligo de la germana komercbilanco estas pli malfaciligita per la formigro de entreprenoj, kiuj produktas kvalitajojn. De aparta graveco estas la kunpreno de spertoj kaj kapitalo, ankaŭ de la teknikaj laborfortoj kaj la postlaso de — eble malnoviĝintaj — produktiloj kaj de nemetiaj laboristoj. Utilon per la eklokiĝo de germana industrio en eksterlando ne havas la germana, sed nur la fremda popolekonomio. En la eksterlandoj tio jam de longe estas ekkonata kaj

estas favorigata la enmigrado de la entreprenoj. La malprofitoj ankaŭ tuŝas aliajn ekonomiajn kampojn. Ne nur estas perdataj devizoj kaj valoraj labortrezoroj, sed la aliaj produktaĵoj en la enlando senvaloriĝas. Per la evoluo de la industrio translokita malaperas iom post iom la espero eksporti al la ĝis nunaj eksportlandoj. Ĉi evoluo estas pli malrapidigita per apartaj difinoj, sed malhelpi estas tute ne ebla. La kapitalo estas internacia kaj ankoraŭ ne demandis al bonstato de opa ŝtato, se temis pro negoco.

Hermann Scherbaum (1378).

El Nederlanda Hindio

El la raporto de la labor-inspekto (instituto registara, kiu kontrolas iomete laborkondiĉojn rilate higienon, sendanĝerecon, labordaŭron, ktp.) diskoniĝis io pri la laborkondiĉoj sur la *Ombilin*-kampoj en *Sawah-Loento* sur la insulo *Sumatra*. En la minoj tie laboras punlaboristoj, sed ankaŭ t. n. kontraktlaboristoj. Ĉi lastaj estas indiĝenoj varbitaj en *Java* (insulo). Kiam ĉi homoj, plejparte kamparanoj, subskribas la kontrakton, ili ne havas ian imagon pri la laborego en la mallumaj koridoroj en la intestoj de la tero, ili ne scias pri la laboro, en la minoj inter la al multaj jaroj de malliberiga puno kondamnitaj punlaboristoj.

La peniga, malfacila vivo en *Sawah-Loento* kaŭzas, ke multaj kontraktintoj malplenumas la kontrakton. Ili forkuras, sed estas ofte kaptataj kaj tiam punataj laŭ la leĝreguloj de la "*Poenale Sanctie*".

En 1924 estis el la 5000 kontraktintoj ne malpli ol 2779 kondamnataj pro malrespekto al la t. n. "*Koelie-ordonantie*". Inter la punoj estas ankaŭ la t. n. "*rotan*"-puno. La punoto estas ligata al fosto, la manoj kunligitaj, la brakoj supren kaj tiam li ricevas dek batojn per la "*rotan*".

Laŭ la raporto de la labor-inspekto estis en 1923 sole en la regna ŝtonkarboentrepreno en *Sawah-Loento* po tago 16 personoj tiamaniere punataj. Ili ĉiuj estis laboristoj. Ilia sola krimo estis, ke ili iel ne estis plenumintaj la kontrakton.

Membro de la Hindia Popol-konsilantaro demandis al la registaro pri la en la raporto de la laborinspekto menciitaj hontigaj situacioj en *Sawah-Loento*. Respondis la registaro, ke ĝi opinias, ke ne ekzistas motivoj por publikigi la raporton. Jes ĝi volus doni la raporton por montri al la popolkonsilantaro.

Sed ĉi tiu konsilantaro tute ne estas konsilantaro de la popolo, la laboranta popolo en ĝi ne estas reprezentita.

— En *Soerabajo* estas striko en la metalindustrio. Proksimume 3000 laboristoj ĉesis labori. Kaŭzo estas maldungo de unu laboristo. La strikantoj postulas nenilgon de la maldungo kaj plialtigon de la salajro. La gvidantoj de la striko jam estas malliberigitaj, pro "instigo al malobeo".

— Ok laboristoj de la Marino-establajoj estas maldungitaj pro propagando por komunismo.

— La *Soerabaja Komercgazeto* ekscias, ke baldaŭ estos publikigata leĝo kontraŭ la propagando de komunismo.

— *Soewito*, redaktoro de en *Salatiga* aperanta komunista organo estas arestita pro artikolo en sia gazeto.

— La kongreso de la *Hindia Societo de tram- kaj fervoj-laboristoj*, kiu estus okazinta je kristnasko 1925, estas de la polico malpermesita. Laŭ sciigoj el "De Tribune", kompilis *670*

La laborista movado en Egiptio

M. Azis

Ĝis la mondmilito, la egipta industrio estis tiom maldisvolvita, ke la egipta laboristo, malklera, obskura, malspritigita, opiniis sin feliĉa, se li povis trovi laboron almenaŭ por plej mizera rekompenco. Evidente, en tiaj kondiĉoj li fariĝis la viktimo de plej senhonta ekspluatado.

Tamen la industriigo en Egiptio (elvokita pro la mondmilito) ŝanĝis la situacion. La milito malpligrandiĝis la alvenon en Egiption de varoj eŭropaj, precipe anglaj, kaj per tio kontribuis al la evoluigo de l' enlanda industrio, precipe teksa kaj nutraĵa. Samtempe kun tio malgrandiĝis la alfluo de l' blankulaj laboristoj, kiuj ĝise okupis la kvalifikajn postenojn en la egiptaj fabrikoj kaj uzinoj, kaj por la indiĝenoj malfermiĝis la dungitebleco.

Nuntempe oni povas en Egiptio kalkuli ĝis 500000 laboristoj. Krom la industriaj laboristoj, al tiu nombro koncernas ankaŭ la laboristoj de l' fervoj-konstruado, de l' ŝosefarado, akvumaj laboroj, dokoj ktp. Parolante pri la egipta proletaro, estas neeble prisilenti la kamparan proletaron de l' lando. La etkamparuloj (felahoj) kaj la agrikulturaj dunglaboristoj konsistigas nombron je 8500000 h. Per iliaj ŝvito kaj laboro kreiĝas la grandegaj riĉaĵoj de l' indiĝenaj bienuloj kaj almigrintaj posedoloj, mastrantaj vastegajn grundriĉaĵojn. La mizerega salajro devigas la kamparulojn forlasi la vilaĝon kaj veni urbon, serĉante laboron. Per tio mem pligrandiĝas la senlaborulaj kadroj.

Se ni ekobservos la egiptan proletaron, ni rimarkos, ke ĝi kuntenas tri kategoriojn diversajn: unue, et-oficistojn, kontoristojn, kiujn la malalt-nivela salajro devigas sindikat-unuiĝi por batali pro la ekonomia pliboniĝo. Due — kvalifikitajn laboristojn (fervojistoj, PTT-istoj, irigacistoj[1]), pli bone salajritaj, sed ideologie malantaŭenemaj. Trie — la senkvalifikaj laboristoj: teksistoj, maristoj, dokistoj, terfosistoj, plantistoj ktp. Ilia salajro estas la plej malalta kaj malsuperas la porvivan minimumon, ja ili ricevas ne pli ol 6—9 piastrojn potage. La longeco de l' labortago alternas de 10 horoj (dokistoj) ĝis 14 (plantistoj).

[1] Akvumad-kanalaj laboristoj (Trad.).

Sed ĝuste la lastkategoriaj laboristoj okazigis dum la lastaj jaroj serion da grandstrikoj, el tiu nombro la faman strikon ĉe la aleksandriaj olea kaj sapa fabrikoj (marto 1924).

La strikoj, kiuj, ĝenerale, atestas la vekiĝon de l' laboristaro, komencis en Egiptio jam de 1910, kiam okazis la ĝenerala striko de l' fervojistoj kaj laboristoj el la ŝtataj metalurgiaj uzinoj en Bulaik kaj Embabkh (antaŭurboj de Kairo). La strikon postsekvis sangoplenaj konfliktoj kaj ĝin kruele likvidis la egipta polico kaj la anglaj trupoj.

La sindikata movado egipta jam havas aĝon de 20 jaroj. Tamen, la sindikatoj, funkciintaj ĝis 1919, estis malmultanaraj, malfirmaj kaj havis malgrandan signifon en la vivo de l' laboristaro. Tiaj estis: "El-sanaje-El-Duzia" (unio de l' manlaboristoj), organizita en Aleksandrio kaj Kairo 1907, ĝi nombris 2300 anojn, sed ne sukcesis aligi al si la larĝajn laboristamasojn kaj konstante misfunkciis; la cigaredista unio, fondita en 1904, la tipografista, organizita en 1906, k. cet.

Nur en 1919, sub la influo de l' kreskintaj por liberiga movado kaj strikoj, larĝonde kovrintaj la landon, komenciĝis ĉiuloke la sindikat-organizado. Al tiu momento rilatas la kreo de tuta serio da organizaĵoj. En 1919 organiziĝas "Gemint-Tamadon-El-Umall" (Unuiĝo de l' laboristoj), kien komence venis nur tajloroj kaj fervojistoj. En diversaj urboj fondiĝis unuiĝoj de sukeristoj, bierfabrikistoj, seruristoj, ŝuistoj, komizoj, ktp. La "Unuiĝo" kreskas kaj nombras jam 15000 (25 sindikatojn), sed seriozan influon super la egipta laboristaro ĝi ne posedas; ĝi estas tro etburĝ-spirita.

En 1921 en Aleksandrio kunvenis laborista kongreso de Egiptio kaj post tio fondiĝis proletspirita organizaĵo, gvidata de laboristoj (la ĝenerala konfederacio de l' Laboro, aniĝinta al Ruĝa Prof. Intern.). Ĝi rapide gajnis la simpatiojn de l' laboristoj, ĝia influo kreskas kaj en ĝiaj vicoj baldaŭ estos 50000 anoj. La konfederacio aranĝis dum 1923—1924 multajn strikojn. Sed ĝi kaŭzis al la burĝoj kaj al la registaro timon kaj malamon. Tial Zaglul-Paŝa ordonis en 1924 ĝian likvidon.

Komprenante la signifon de l' laboristorganiziĝo, la registaro iniciatis la aranĝon de "Ĝenerala Unuiĝo de l' laboristoj de Egiptio", gvidata de Abd-el-Rakhman-Fakhmi-Bej (kunaganto de Zaglul) kaj de aro da burĝaj advokatoj. Ĝian karakteron bone montras tio, ke kiel honora prezidanto ĝi elektis . . . la egiptan reĝon Fuad.

Krom tio ekzistas pluraj ne tiom signifhavaj unioj: ekz. de la dokistoj el Suez, Port-Said, Aleksandrio.

La organizadon de revoluci-tendencaj sindikatoj la registaro senkompate persekutas, kaj la egiptaj laboristoj devas tre grandpene batali pro la koalici-rajto.

(Espigis V.)

El Loanda

La 13. dec. 1925, laŭ publika invito de la koncerna organiza komitato, konsistanta el 5 laboristoj, kelkdekoj da proletoj el Loanda kunvenis por starigi la Miksan Sindikaton de la Laboristoj el Loanda.

La kunveno ne estis multe vizitata ne nur tial, ĉar ĝi estis anoncita nur je la antaŭa tago, sed ankaŭ tial, ke, lasthore cirkulis famo diranta, ke ĝi estus malpermesata de la aŭtoritatuloj.

Tio tamen ne okazis kaj la kunvenintaj laboristoj entuziasme diskutis kaj aprobis la statuton de la sindikato.

Ĉar neniam estis en Angola simila, vere revolucia, sindikato, la proleta kunveno de la 12. dec. 1925, inaŭguras la laboristan revolucieman movadon en Angola.

La nova sindikato arigas la laboristojn el ĉiuj metioj tial, ĉar la proleta klaso en Loanda estas sufiĉe malmultnombra; estus malfacile, almenaŭ je la komenco konstitui laŭmetiajn sindikatojn.

La organiza komitato kaj la plej granda parto el la kunvenintoj estis fervojlaboristoj de Loanda.

— Je la sama tago okazis ĝenerala balotado por la Municipalitato el Loanda, fakto jam ne okazinta de antaŭ multaj jaroj, ĉar la gubernestroj de Angola preferis nomi komisiojn, sed ne plenumi la leĝojn postulantaj, ke la Municipalitato-oficoj estu okupataj laŭ elekto.

Tri malsamaj listoj estis balotitaj, ĉiuj ili konsistantaj el burĝuloj (komercistoj, kapitalistoj, ktp.).

Kaŭzis grandan sukceson la apero de voĉdonilo, kun ĉiuj nomoj forstrekitaj, sur kiu estis inke desegnita karikaturaĵo de hispana desegnisto Tito. La karikaturaĵo montris fortan laboristan pugnon tenanta martelon kaj sube, pastron, kapitaliston kaj militariston forkurantaj.

La jenaj vortoj ankaŭ vidiĝis: "Ĉu vi ne volas fortan manon? . . . Jen ĝi!"

(3998)

La klerigo en Polio

La klerigo estas tre grava afero. Tion ĉi bone komprenas klaso posedanta kaj ĉiumaniere penadas haltigi ĝin en ĝia antaŭen-irado. Ne nur nun, ankaŭ en antaŭaj tempoj, pri sciencoj okupiĝis nur pastroj kaj monaĥoj. La eklezio estis tiam tre potenca. Sed tempoj ŝanĝiĝas kaj klerigo estas nun ne nur propraĵo de l' pastraro, sed ankaŭ de pliriĉiĝinta urbanaro. Sed laboristoj kaj kamparanoj, senkompate subpremegataj, staras malproksime de ĝi. Oni ne klerigadas ilin. Ja ili ne bezonas.

Klerigita laboristo aŭ kamparano dejetus la jugon de sklaveco. Venis tempo, — nova kapitalistordo, kiam regas ti-kiu estas riĉa, kiu akiris kapitalon pere de subpremado de laboristo aŭ kamparano. Sed burĝaro regas ne nur per kapitalo, sed ankaŭ per sia scio kaj klereco. Laŭ ŝtataj elkalkuloj en Polio je ĉiuj 1000 loĝantoj estas ĉirkaŭ 200 infanoj en lernaĝo. En tuta Polio estas nun ĉirkaŭ 5 milionoj 500 mil infanoj. Ili devas lerni, sed ne lernas, ĉar pli ol 2 milionoj da infanoj ne iras en lernejojn. Ministroj de klerigado ordonas fermi popollernejojn. Anstataŭ malfermadi kaj konstruadi la novajn, oni ruinigas tiujn, kiuj jam estas. Do en jaro 1924 la registaro fermis 3 mil popollernejojn krom tio 8 seminariojn kaj 4 porinstruistajn lernejojn. Verŝajne la popolo estas jam tro klerigita. Do fermi lernejojn — ĉar klerigita popolo ne permesos sin subpremadi. Tiel prezentiĝas afero en centro de l' ŝtato. Sed sur apudlima teritorio oni pli maljuste traktas tiean loĝantaron, ol la polan. En jaro 1910 sur tiel nomata apudlima teritorio estis 242 mil gelernantoj, dume en 1922 estas nur 235 mil (nun la afero prezentiĝas pli malbone). Do *germanoj* kaj eĉ paĉjo



LA NEEDUKITO ESTAS BLINDULO
El "The Plebs".

— caro — ĉi sanga caro, kiu regis per vipo kaj skurĝo pli zorgis pri klerigado. En Poleski vojevodio (gubernio) en 1921 estis 34 lernejoj ukrainaj, dume en jaro 1923 estis nur 20, do 14 estis fermitaj! Por 14 mil infanoj estis malfermita nek unu blankrusa lernejo. En Novogrodzki vojevodio ekzistas nur 1 blankrusa lernejo kaj en Vilna vojevodio de 186 lernejoj restis en 1923 nur 23. Nuntempe tie estas nek unu blankrusa lernejo. Tie regas la plej granda malklereco, kie estas plej multe da homoj ne scipovantaj legi kaj skribi — tie pola registaro plej malmulte zorgas pri klerigado. *Pola registaro volas ŝpari monon pere de malklereco de popolo.* Oni stultigas popolon, kaj monon ofte destinas por "malriĉaj" fabrikantoj. La registaro permesas malfermi 28 mil drinkejojn, dume estas nur 27 mil lernejoj. Pli da drinkejoj ol lernejoj. Meznombre en tuta Polio triono de l' infanaro estas kondamnita al malklereco.

Nun en Polio estas 86 mil policistoj kaj nur 60 mil instruistoj. Ĉi policistaro devas edukadi civitanojn de Polio.

Interese estas vidi kiel prezentiĝas afero de popollernejoj. Tie plej ofte unu instruisto instruas ĉirkaŭ 100 diversajn geinfanojn, kunvenigitajn en unu malpura ĉambreto kaj okazas eĉ en iu konstruaĵo por brutaro. Multaj instruistoj ne scipovas eĉ bone legi kaj skribi.

Mezlernejoj, kiuj estas nur en urboj, estas lernejoj nur por kapitalistoj kaj oficistoj, — ili estas ŝtataj lernejoj. Tie estas filoj de laboristoj kaj kamparanoj, sed kiel malmultnombraj! Por ĉi-lernejoj instruistoj estas bone preparitaj, ĉiu el ili instruas nur unu lernobjekton. En ĉiu lernejo estas ĉirkaŭ 20 instruistoj, en unu klaso lernas meznombre 32 infanoj, ne 100, kiel en popollernejoj. Gimnazioj edukas lernanton por superaj lernejoj, universitatoj, politeknikoj k. a. Dume popollernejo, lernejo de malriĉuloj estas senelirebla strato, el kiu ne estas elirejo en la vastan mondon. Por ĉiu lernanto de ŝtata mezlernejo la ŝtato elspezas ĉiujare 250 pol. florenojn, dume por lernanto de popollernejo nur 50 fl., do kvinoble malpli.

Plu mi ne skribos. Ĉar mi estas certa, ke vi, karaj k-doj, komprenos ĉion sen pluaj vortoj. Sufiĉas.

Lib. trad. el "Orka" *H. Halpern.*

Kiel evoluas la sindikatoj en Sovet-Unio (statistiko)

Ni deziras tiajn raportojn de tempo al tempo ankaŭ el aliaj landoj kaj mondpartoj.

En la organo de l' Tutunia Centra Konsilejo Sindikata "*Trud*" (Laboro) aperis interesaj informoj pri la evoluo de l' sovetia sindikataro dum la lasta 1—1 1/2 jaro.

La 1. aprilon 1924 la sovetiaj sindikatoj nombris entute 5 822 682 anojn, la 1. oktobron 1924 6 430 470, la 1. aprilon 1925 6 950 484 anojn, hodiaŭ superas 7 000 000.

La fakto estas sufiĉe karakteriza, ĉar ĉi-jarojn ni rimarkas okulfrapan plimalmultiĝon en la alilandaj sindikatoj.

La evoluon kompreneble kaŭzis la ĝenerala reviviĝo de l' ekonomia vivo: de l' industrio kaj kampmastrumo.

Por ke la bildo de ĉi-evoluo estu pli klara por ĉiu, sufiĉas prezenti al la legantoj ĉi-tabelon, kie estas montrite, kiel plimultiĝis ĉiu sindikato malope:

	Sindikato	1. aprilo 1924	1. aprilo 1925
Agrikult.	Laboristoj de l' tero kaj arbaro . . .	297 868	497 636
Industriaj	Paperistoj	28601	32418
	Ministoj	294913	282283
	Lignistoj	127871	175045
	Ledistoj	94483	109506
	Metalistoj	541135	618482
	Presistoj	81132	94142
	Nutraĵistoj	275107	341749
	Sukeristoj	58799	129747
	Konstruistoj . . .	211937	316634
	Teksistoj	502481	624137
	Kemiistoj	162358	180662
	Kudristoj	57322	65079
		2436139	2099884

Transportligilaj	Akvotransportistoj	139366	139412
	Fervojistoj	769500	805588
	Loka Transporto .	147242	164919
	Ligilo (P. T. T. R.) .	102906	102006
		1159014	1211925
Servaj	Komunumlaboristoj	175381	198083
	Popola Nutrado kaj Hoteloj . : . .	89628	135133
		265009	333216
Ceteraj	Artistoj	72862	75720
	Medicino-Sanitario	343073	382615
	Klerigado	526692	585021
	Ŝtat. kaj Komerc-oficistoj	722025	694467
		1664652	1937823
	Entute	5822682	6950484[1])

Unu el la plej veraj kriterioj por juĝi, ĉu la sindikatoj penis plibonigi la laborkondiĉojn de siaj anoj, estas kompreneble la *nivelo de l' salajro.*

La ĉiam altiĝantaj dimensioj de l' laboristaj salajro montras, ke la sindikatoj senĉese altenpuŝis kun sukceso la porlaboran pagon.

Ĉi-ciferoj elokvente tion afirmas:

Meza monata salajro en la peza industrio:
en or-rubloj:

Industri-fako	julio-septembro 1924	oktobro-decembro 1924	januaro-marto 1925	aprilo-junio 1925	julio-septembro 1925
Metalurgia	43,4	45.2	46,3	50,2	56,0
Teksa	34,6	34,4	34.5	36.6	44,0
Mineja	37,4	35,0	35.2	37,9	43,0
Kemia	40,1	40 8	41.5	44,8	48,0
Leda	53,6	56,9	59,2	63,9	—
Presa	70,0	70,6	67,7	71,3	75,0
Nutraĵ-gustumaja .	53.2	56.6	53,7	56,5	—
Papera	39,8	40,0	39,7	42,2	45,5
Tra la tuta industrio	40,0	40,2	40,6	43,5	49,0
En Moskvo	61,3	62.6	62,6	65,9	—
En Leningrada reg.	57,4	61,9	61,4	65,2	67.0
En provinco . . .	36,6	35,7	36,2	39,1	45,3

En oktobro-novembro 1925 la laboristoj de l' metalurgio ricevas 76 % de l' ĝismilita salajro, de l' teksa industrio 123 %, mineja 67 %, kemia 115,7 %, presa 109 %, papera 123 %, tra la tuta industrio ĝenerale 95 %.

V. K.

El Polio

Iom pri demonstracioj de senlaboruloj

En Varsovio dum pasinta semajno senlaboruloj penadis kelkfoje organizi protest-manifestaciojn, kiuj estis dispelitaj de policistoj. La samo okazis en Zaviercie, kie senesperigitaj senlaboruloj perforte eniris en kancelariojn de urbdomo (magistrato). Polico arestis multajn.

Ĝenerala ĉiutaga elspezo por vivsubteno de laborista familio, konsistanta el 4 pers.

en Varsovio
(en zld.)

Aŭgusto 1925	6.78	(1 dolaro = 9 zld.)	
Septembro 1925	6.95		
Novembro 1925	7.16	*nun*	

1) Ni ripetas, ke de tiu tempo (1. aprilo 1925) la sindikatoj denove grave pligrandiĝis (ekz.) ministoj, metalistoj, teksistoj, fervojistoj).

Senlaboreco en grandindustriaj centroj de Polio
(en oktobro)

Lodz	39870	pers.
Sosnowiec	21070	„
Silezio	58550	„

Senlaboreco en Polio (oficialaj ciferoj)

3. oktobro	196430	
17. „	203500	
31. „	213480	
7. novembro	218883	
14. „	231764	Ciferoj parolas
5. decembro	261851	per si mem.

Tabelo de pligrandiĝo de vivkostoj

En Varsovio dum la jaro 1914 = 100

Grupoj	Sept. 1925	Okt. 1925	Nov. 1925
Ĝeneralaj kostoj	152.0	155.1	158.1
Nutraĵo	170.9	175.7	178.2
Vestaĵo	255.5	255.5	264.5
Hejtado	161.4	165.7	167.3
Loĝejo	60.2	66.1	66.1
Restaĵoj	178.7	178.9	179.0

Produktado — komerco.

Detaligo	Meza ĉiu-monat. 1923	Meza ĉiu monat. 1924	Julio 1925	Aŭg. 1925	Sept. 1925
Produktado en miloj da tunoj:					
Ŝtonkarbo	3008	2692	2100	2085	
Koakso .	111.0	78.8	76.0	78.9	
Nafto . .	61.4	64.2	64.3	70.8	67.2
Fero krud.	43.4	28.0	25.1	24.1	
Ŝtalo . . .	94.6	56.6	76.9	66.6	
Eksterlanda komerco en milion. da zld.					
Spezo . .	192.6	228.6	267.3	219.2	181.6
Eksporto	99.6	105 3	86.9	103.0	108.8
Importo .	93 0	123 3	180.4	116 2	72.8

Kelkaj sciigoj el Argentino

Ĉi tiu monato estas la rikolta monato de grenoj: tritiko, lino ktp. Ĝis la momento kiam oni ekkomencis falĉi kaj draŝi, per tiuj maŝinoj, kiuj samtempe falĉas kaj draŝas, nomataj ĉi tie "Aŭstraliaj", oni esperis abundan rikolton, sed tuj oni disreviĝis, ĉar oni notis, ke la sakoj ne pleniĝas, el grajnoj fariĝadis polva nubo. La grenoj estis formanĝitaj de iu tre malgranda, sed treege multenombra fungeto, kiun oni nomas "roya". Ankaŭ la malfruaj frostoj, kiuj okazis en la unua duono de la monato oktobro, kaŭzis danĝeron. La tre abunda malsekeco, ĉar tre ofte pluvis, treege favoris plimultobliĝon de tiu danĝerega malamiko. La ekspluatata klaso jam sentas la pezon de la rikolta perdo, ĉar la panon nun oni devas pagi per 40 centavoj po kilogramo, ĝis la komenco de ĉi tiu monato oni pagis 30 centavojn, en kelkaj lokoj 35 centavojn. La nuna stato de la kamplaboristo estas tre mizera, jen la raporto de korespondanto de la plej grava burĝa ĉiutagĵurnalo "La Capital" (elp. La Kapital") el la grava urbo Rosario: "Pro la rikolta perdo de tritiko estas multaj laboristoj senlaboraj, sekve al ili mankas la plej necesaj vivrimedoj. "Multaj el ili iras de pordo al pordo almozpetante peceton da pano aŭ plenmaneton da herbo-mate-o. Ĝis la rikolto de maizo (ĝi promesas estis tre fruktodona) ilia sorto ne ŝanĝiĝos, ĉar la perdo de la rikolto okazis ĝuste en tiuj provincoj kaj regionoj, kie la terkulturo estas plej vasta. La unua estas la provinco Cordoba (elp. Kordova), tie laŭ la freŝaj datoj perdiĝis ĉirkaŭ 80%. Sekvas ĝin la provinco Santa Fe, jen la oficialaj datoj de la perdo en ĉi tiu provinco:

Departementoj	Hektaroj semitaj	La perdoj en procentoj	
Belgrano	51.426	80	En ĉi tiu dep. loĝas mi
Constitucion . . .	17.109	15	
Caseros	48.500	30	
Castellanos	192.225	80	
Garay			
General Lopez . . .	99.602	50	
General Obligado			
Iriondo	42.418	60	
La Capital	4.911	70	
Las Colonias . . .	68.144	80	
N. de Julio	2.019	90	
Rosario	2.530	20	
San Cristobal . . .	68.975	90	
San Lorenzo . . .	13.649	15	
San Justo	4.200	50	
San Javier			
San Jeronimo . . .	67.483	80	
San Martin	168.550	70	
Vera			

Ĉi tiuj datoj rilatas la tritikon, rilate la linon la perdoj ne estas tiom gravaj, ĉar ĝian grajnon ne danĝerigis la "roya", en la lino la perdon pro la frostoj oni kalkulas je 20%. *Satano* (1933)

Letero el segejo de Finnlando

Kiel oni scias, lignoindustrio estas la plej granda industribranĉo de la lando. Kaj lignoeksporto kun eksporto de paperproduktaĵoj formas ĉirkaŭ 90 % el tuta eksporto de Finnlando. Devenante de tio estas tute nature, ke laboristaro de la lando konsistas plejgrandparte el segejlaboristoj. La segejoj, kiuj troviĝas ĉie en la lando, apud fervojoj kaj ireblaj akvovojoj, laŭ ilia grandeco havas 2—4 framojn 1), sed ankaŭ ekzistas pli grandaj 6—12 framoj. Finna ŝtato ankaŭ havas nun 12 framan segejon en Nord-Finnlando. La laboristoj kaj laboristinoj, la lastnomitaj ankaŭ laboras grandnombre en segejoj, estas salajrataj laŭ labormaniero, sed gelaboristoj, kiuj faras alian laboron ekstere de segejo oni salajras pohore. Salajro po arbtrunko varias tre multe en diversaj segejoj kaj estas pligranda en segejoj kun framnombro malgranda aŭ en tiuj provizitaj per malnovstilaj maŝinoj. Ĉar novstila framo, per kiu laboras du viroj, produktas preskaŭ pli ol maŝino malnovstila kun kvar viroj. La salajron oni kalkulas laŭ nombro de segitaj arb-

trunkoj por ĉiu laboristo, kaj se en du-frama segejo oni segas 800 arbtrunkojn, la salajro por segisto estas 6 fmk., por cento li ricevas 48 fmk. dum okhora labortago. La salajro en 4 frama segejo povas esti nur 3 fmk. por cento, sed segejo produktas po 1600. La supre citita nombro ne estas akirebla per grandaj arboj kaj dum severaj frostoj.

Salajroj en segeja laboro povas en plejbonaj okazoj akiri 50 fmk., sed plej-ofte ĝi restas 45—40 fmk. La horsalajroj estas treege malaltaj. Ekz.: viroj ricevas 4,25 ĝis 5,50 fmk. pohore kaj virinoj 2,50 ĝis 2 fmk. pohore.

Salajro por pliaj horoj, kiu estas deviga laŭleĝe, estas jena:

Por du unuaj horoj salajro devas pli-altiĝi per 50 % kaj por sekvantaj horoj per 100 %, ankaŭ por dimanĉoj kaj religiaj festotagoj per 100 %.

Prezoj de kelkaj vivbezonaĵoj estas ĉirkaŭe jenaj:

Butero . . .	33.—	ĝis 40.—	mk. po kg.
Margarino . .	20.—		„ „ „
Faruno sekala .	3.—	„ 4.—	„ „ „
Faruno tritika	6.50	„ 7.25	„ „ „
Kafo . . .	40.—	„ 36.—	„ „ „
Sukero . . .	9.—	„ 8.—	„ „ „
Viando bova .	6.—	„ 8.—	„ „ „
Viando porka .	16.—	„ 18.—	„ „ „

Gelaboristoj tie ĉi norde havas ankaŭ pli da prizorgo por siaj vestaĵoj ol en pli sudaj lokoj de terglobo, kaj la segejoj ĝenerale estas tute malfermaj por frostoj. Sed laboristoj precipe en vastaj arbaroj estas plene elliverataj al la malvarma vetero, ĉar ili nur povas transnoktiĝi en plej malbonaj domaĉoj, kiuj nur estas konstruitaj por ĉi loka, okaza labordaŭro.

[1]) segmaŝino.

Vojaĝemulo.

DISKUTEJO

Pri malsanoj

En n-oj 13/14 kuracisto deziras, ke la temo pri malsanoj estu diskutata ankaŭ per laikoj. Do mi deziras sciigi mian opinion tiurilate en laika parolo mallonga.

Ŝajnas, ke k-do Fröding estas kutimanta sian korpon al severa vegetara vivmaniero, atinginte bonan sukceson. Kaj estas granda parto da vereco en sia opinio pri malsaniĝo, sed pravas same k-do kuracisto; ĉar mi kredas, kaj multaj aliaj estas konvinkataj, ke homo samparte pro neceso bezonas ĉiujn nutraĵojn, viandan kaj herbaĵan. Supozite estas, ke li ne troigas en manĝado (kiel same en trinkado). Se ĉiuj homoj povus nutri sin nur per legomaj vegetaĵoj kaj fruktoj, ne eble estus kulturado tiom multe da tiaj specoj. Ankaŭ en vintro estus uzota multe da sekigitaj herbaĵoj.

Nun estas dirite de la scienco, ke la dentaro homa estas kreata por ambaŭspeca nutraĵo, tiom same por viandnutraĵo kiel vegeta nutraĵo.

Kiam en varmegaj klimatoj la homoj devas manĝi pli multe da fruktoj kaj legomoj ol viandmanĝaĵoj, tiam tio kaŭzas la tropika naturo. Tiuj nutraĵoj ne donas nebezonatan varmecon. Male en malvarma klimato la homoj devas manĝi pli multe da viandnutraĵo kaj graso; eĉ en malvarmegaj regionoj ili manĝas aŭ trinkas multe da oleo besta, por ebligi teni sin varma kontraŭ la severa malvarmeco.

Se oni agas sence kaj racie je sia manĝado, t. e., varias je la nutraĵoj kaj obeas al la demandoj de sia korpo, ne diboĉas kaj ne devas malsati aŭ loĝi mizere, estas la naturo mem, kiu montras la vojon al saneco. K-dino *A. B.*

Esperanton en lernejon!

Antaŭ instruistaro staras nun tre grava demando pri enkondukado de esperanto en lernejon.

Je nuna momento estas neeble preterlasi tiun ĉi demandon, kiam ni vidas, kiel kreskas kaj larĝiĝas pionira movado, ĉirkaŭkaptinte tutan terglobon, kiam fortega KIM (Komuna Internacionalo Gejunulara) eniĝas en ĉiujn anguletojn de l' mondo. Ni enkondukis en lernejojn de l' 1. kaj 2. ŝtupoj germanan kaj francan lingvojn, sed celo, kun kiu ili estis enkondukigantaj, ne estas atingita.

Tute alia afero estas lingvo Esperanto. Je unuaj tagoj de ellernado lingvon Esperanton antaŭ geknaboj malfermiĝas tuta lerneja infana mondo (inkluzive ĝis insulo Taiti.

Tiam komenciĝos vivplena interŝanĝo per leteroj, per ilustraĵoj, per fotografaĵoj, per desegnaĵoj.

Lerneja ekspozicio ornamiĝos per novaj interesaj eksponatoj. Murgazeto kompletiĝas per leteroj de eksterlandaj membroj de l' gejunulara komununuiĝo, de pioniroj, de lernantoj.

Pulso de lernejaj rondetoj ekbatos pli forte. Muta geografia karto pleniĝos per realaĵo.

Kaj ĉu logike konstruita Esperanto helpos bonfaritan influon je ellernado de parenca lingvo? — Sendube: pri ĉi tio parolas niaj kaj eksterlandaj instruistoj, kiuj estis instruintaj Esperanton.

Kaj ankoraŭ larĝa kunrilatiĝo de lernantoj kun eksterlandaj kamaradoj estos akcelonta al sennacieca edukado psikologion de nia generacio. Popola Komisaro de Instruado jam permesis instruadi Esperanton en lernejoj, sed manko de konvenaj kadroj de instruistoj en lernejoj ne permesas disvolvi sufiĉe larĝe la aferon.

El tiu ĉi konkludas, ke instruistomasulo aperigu sian iniciativon kaj propravole pligrandigu sian malfacilan portaĵon. Ĉi signifas: 1. Organizi rondetojn de ellernado kaj apliko lingvon Esperanton. 2. Persone komenci ellernadon de l' lingvo, se estas neeble la unua, kaj 3. Enkonduki Esperanton en lernejojn, kie estos eble.

Suvorov Leonido (Urjenj) 5402.

Por kio mi lernis Esperanton?

Estas la senco de nia SAT-ana movado, valorigi la internacian lingvon "Esperanto" por la klasbatalo proletara.

Unu el la rimedoj, eble la plej nobla por ni laboristaj esperantistoj — ĉar pro manko de mono nur tre malofte ni povas aranĝi personan kunvenon internacian — estas la korespondado, ĉefe inter diversnaciuloj. Kaj estas vere granda ĝojo por la partoprenantoj, se la korespondado havas bonan fluon. Sed ne nur por la korespondantoj mem; oni plej efekte povas interesigi multajn personojn ĝis nun indiferentaj kaj eĉ malamikaj al Esperanto. Mi mem iam, ho, iam havis korespondadon, kiu rajtigis al esperoj plej grandaj. Nature mi ankaŭ sukcesis konvinki iun mokulon pri la nesensencemo de nia penplena kunlaborado je la antaŭenpuŝigo de la laboristaro, je la interligado kaj fratigado de la proletaro tutmonda. Grandan intereson mi ĉiam trovis, se mi havis okazon traduki novan leteron de miaj ministaj kamaradoj anglaj en Dewsbury kaj Batlay al sampartianoj kaj kolegoj. Sukcesinte en miaj penoj komenci korespondadon kun kamarado en Japanio. La entuziasmo por nia lingvo inter miaj konatuloj kompreneble kreskis kaj tiuj estis atendintaj senpacience raportojn pri vivo kaj faro de niaj samsortanoj orientaj.

Sed, bedaŭrinde ili kaj mi ĝis hodiaŭ ankoraŭ post kelkaj komencoj esperigaj vane atendas. Spite miaj penoj, preskaŭ frenezigaj, ricevi klarigon pri la kaŭzoj de la nepluskribado ĉefe flanke de miaj anglaj kamaradoj, mi tute ne sukcesis. Ne revenis miaj poŝtaĵoj diversaj, ne ankaŭ helpis la perado de samideano. Tute mi ne povas imagi, kio estas kulpa je la subita silentado persista.

Nun mi volas vastigi mian lingvan konon kaj doni al mia esperanta scio pli precizan uzeblecon. Pro tio mi komencis lerni la francan lingvon. Por faciligi la lernadon — tion mi eksciis per la lernado kaj instruado de Esperanto — la studado de gazetoj tagaj kaj ilustritaj en la koncerna lingvo estas bona rimedo. Kaj kio estas pli simpla por esperantisto ol ricevi gazetojn eksterlandajn. Mi ja ĉiulande havas fratojn helpemajn, kiuj volontege plenumas mian deziron modestan, des pli volonte, ĉar mi estas preta, fari la samajn servojn aŭ repagi la malaltajn elspezojn. Sed mi estas farinta denove mian kalkulon sen ĉi tiu nekonata, kiu kulpas la disrompon de mia korespondado. Kelkfoje de kamarado en Troyes kaj ankaŭ de Lyona Laborista Esperanta Grupo mi ricevis gazetojn. Nun denove ne plu funkcias la puto. Eĉ mia peto perigi al iu interesita kamarado, kiu de tempo al tempo al mi povas sendi ian ĉifonitan kolbasfolieton, mian nomon kaj adreson ŝajne ne estis atentita. — Ĉu mi do estas la sola esperantisto en la tuta mondo? Por kio mi nur eklernis esperanton?

Max Köhler 1204.

≡ RADIO ≡

Grava Anonco

Lastan vintron la esperantistoj de la gemelurboj Minneapolis kaj St. Paul, Minnesota, Usono, dissendis sian unuan programon en Esperanto pere de la potenca radio stacio WCCO. La rezultato estis tiel bonega, ke la estraro de WCCO volonte konsentis dissendi alian programon. Ĝi okazos la 12. febr., je la datreveno de la mondfama usona eksprezidanto Abraham Lincoln, kaj estos de Lincoln'a programo. La programo komencos je la 11,30 horo nokte. Oni elektis malfruan horon, por ke la aero estu pli libera kaj por ke oni estu pli certe aŭdata ne nur en tuta Usono sed ankaŭ en Eŭropo.

Ni urĝe petas ĉiun leganton, ke li nepre skribu al WCCO, Gold Medal Station, Minneapolis, Minnesota, U. S. A., pri lia sukceso aŭ malsukceso en la aŭdado de la programo. La esperantista movado tie ĉi estas nova sed tre vigla. Vi montru la vivecon de la movado ĉe vi per nepra letero aŭ karto.

Aliaj gazetoj, esperantaj aŭ naciaj, bonvolu represi ĉi tiun anoncon kaj nepre transskribu nian tempon en la vian, por ke la aŭskultontoj ne faru eraron pri la horo. En Mez-Eŭropo la tempo estos ĉirkaŭ la 5. horo matene la 13. febr.

Radio-Internacio [1])

Ni laboruloj devas meti en la servon de nia ekspluatata kaj batalanta klaso ĉiujn kaj ĉiajn rimedojn taŭgajn kaj konvenajn. Al tiuj enviciĝis laste la sendrata ondo etera. Al sata burĝaro ĝi servas kiel distrilo kaj amuzilo, al monavidaj fabrikistoj kaj komercistoj kiel "monfarilo" kaj al ni ĝi servos kiel batalilo en nia kultura laboro kaj por emancipiĝa batalo. Eluzi ĉi inventaĵon kaj utiligi ĝin por niaj interesoj estas devo nia kaj tute precipe por la SAT-anoj radioamatoroj prezentiĝas dankinda tasko, kies plenumo estos nepre fruktodona. Nia tutmondon ampleksanta SAT-aparato helpu kaj servu al same mondampleksanta laborula radio-movado kaj per tio al tutmonda proletariaro.

La radioamatoroj inter laboristaro estas tre multnombraj, sed plejparte ili posedas simplegan detektor-aparaton per kiu ili kapablas ricevi nur la ondon de la loka sendostacio. Por havigi aŭ konstrui al si lampaparaton mankas mono aŭ okazo aŭ nekapebleco. Kaj laborista radioklubo al kiu ili deziras aliĝi, plejofte ne jam ekzistas. Krom tio en kelkaj landoj aŭ regionoj — ekzemple ĉi tie en la antaŭnelonge forlasita de l' okupacia armeo parto de Rejnlando la radiomovado ankoraŭ estas tre juna. Aliflanke la akraj kondiĉoj, ekzameno ktp. por akiri permeson konstrui aŭ funkciigi akceptilon, estas likviditaj, tiel ke depost 1. sept. 1925 ĉiu ajn rajtas senkondiĉe konstrui kaj funkciigi ricev(lamp)aparatojn, se li pagas monate 2 gmk. al la poŝto.

La ideala stato en radio-movado konsistas por ni en tio, ne nur povi akcepti sed ankaŭ sendi (disaŭdigi). Kiam oni rajtos tiom en ĉiuj ŝtatoj, tiam la interkompreno inter la diversaj landoj estos perfekta — se oni aplikos la komunan radio-lingvon Esperanto. En kelkaj landoj, laŭ mia scio en Anglio kaj Usono la amatoroj kaj kluboj jam nun rajtas funkciigi sendilojn. Estus bone, ke tiaj k-doj raportos pri la stato de radio-movado, precipe de laborista en sia lando.

Intencante fondi en Düsseldorf lab.-radioklubon [2]), mi petas ĉiujn gek-dojn al mi sendi ĉian materialon: statutojn, revuojn, skizojn, konsilojn. Mi respondos al ĉiu.

H. Remers, Düsseldorf (656).

[1]) Komparu artik. de k-do Vinogradov en "Senn." n-o 57.

[2]) La unuan entute en okupita kaj forlasita teritorio.

"Saiŝ"

(Mezepoka postvivaĵo en moraro de kirgiza popolo)

Dum la feŭdalismo unu el la ĉefaj amuzoj de nobelaro kaj reĝo estis karakterizaj dubataloj — turniroj. Senco de la turniroj estis tia, ke unu el du kontraŭuloj, kovritaj per fera vestaĵo, rajdante sur galopanta ĉevalo, trafis la alian ĉu per glavo, ĉu per lanco. Plejofte la finalo de turniro estis morto de unu el batalintoj. Tiel estis dum sangoplena epoko de feŭdalismo. Memoron pri la kavaliraj turniroj enhavas nur paĝoj de la historio kaj interesplenaj porjunulaj romanoj de Valter Skott.

Sed en kirgizstano, supre en montoj, sur la Ĝalan, ĉi heredaĵo de antikveco restis ĝis la nuna tempo. Kirgizlingve la turniro nomiĝas "Saiŝ". La batalo okazas jenmaniere.

La fiksitan tagon de dubatalo, du fortuloj-kirgizoj veturas, akompanataj de parencaro, al loko de okazonta turniro. La batalontoj rajdas sur la plej bonaj ĉevaloj. Samideanoj kaj kunsentantoj de la bravulo, lin preparas por la batalo. Al malantaŭa parto de selo oni alligas grandan feltan rulaĵon por ke la rajdanto ne elseliĝu, la bruston de batalanto oni kovras per dika tavolo de felto. Post kiam la preparado estas finita, oni donas al la kontraŭuloj bastonojn, kies longeco estas proksimume 3 metroj. La fortuloj, apoginte bastonojn je seloj kaj tenante ilin rekte kontraŭ brusto de kontraŭulo, disveturas flanken ĝis la 200—300 metra distanco, kaj poste galopegante kuniĝas, penante elseligi unu la alian, per bastonpuŝo en bruston. Ofte okazas, ke la bastono trafas kapon kaj unu el batalantoj mortfalas teren. Nun tiu ĉi sencela kaj danĝera amuzaĵo estas malpermesita de la soveta registaro.

Aziano

KORESPONDEJO

630. Kompreneble mi konsentas.

4668. Poŝkalendaron ni ne havas.

— La Adm. de SAT deziras scii la adr. de la k-doj Wuttke, Nov-Jorko kaj P. Kolev, Sofio. *Adm.*

1810. Via traduklaboro taŭgas, daŭrigu.

3398. Manuskripto alvenis, sed ĝi bezonas esti ege prilaborata. *Red.*

K-do *E. Lanty* petas siajn korespondantojn, ke ili bonvolu noti lian novan adreson. Jen ĝi estas: 14, avenue de Corbèra, *Paris (XII e)*.

≡ KRONIKO ≡

Germanio.

Leipzig. Lab. Esp. grupo okazigis 16. jan. sian Zamenhof-memorfeston. La salonego estis bone okupata. Ĉeestis pli ol 600 personoj. Dank'al kunhelpo de lab. gimnastunuiĝo, de bonega violonisto k-do Bunge kaj k-do Frehse (kantoj laŭ la liuto), la soleno estis varia. Ankaŭ malgranda teatraĵo bone efikis. K-do Maertz parolis al la ĉeestantoj pri graveco kaj signifo de Esp-o. *W. Krey* (5486)

Mittweida i. S. La Esp. movado nialoke estas nun iom pli sukcesplena ol antaŭe. La 23. sept. 1925 la "LEA"-grupo aranĝis kurson kun 23 pers.; plej parte junuloj, gvidanto estas k-do Richter. Ankaŭ la grupvesperoj estas pli bone vizitataj, ilin gvidas k-do Wappler. La grupo aranĝos (printempon) publikan ekspozicion. Bedaŭrinde mankas ankoraŭ materialo. Mi tutkore petas la gek-dojn tutmondajn, sendi esp-aĵojn al ni, ĉu pruntedone aŭ donace. Ni rekompencos ĉiujn laŭdezire. Adreso: Walter Richter, Am Schweizerwald 5, in Mittweida i. S.

Tre optimismaj estas ankoraŭ la sindikat- kaj partiestroj kâj per la ekspozicio ni konvinkos ilin. Gek-doj kunhelpu, por ke ni ne fiasku! *SAT-ano* (2924)

Seifhennersdorf. La Distrikto Orient-Saksio aranĝis SAT-konferencon la 13. dec. 1925 en la gastejo "Kanone" Seifhennersdorf. La grupoj raportis pri la movado dum la pasinta jaro. Ĉiuj grupoj estis tute kontentaj pri la farita laboro kaj sukceso. Novaj kursoj estis malfermitaj en Seifhennersdorf kun 30, en Olbersdorf kun 26, en Leutersdorf kun 33 pers. Ankaŭ du, tre bone vizititaj ekspozicioj estis aranĝitaj. Ni marŝas de sukceso al sukceso, por ke baldaŭ interfratiĝu ĉiuj kamaradoj sur la tero. *Satano* (4247)

Sendu koncizajn raportojn por "Kroniko" sur poŝtkarto!

Nederlando.

Aalsmeer. En la neŭtrala esp. grupo "Ĉiam supren" enhavante 17 anojn, inter ili estas 3 SAT-anoj, oni decidis aboni "Sennaciulo"n por ĉiuj anoj, je la kosto de la societo.

Polio

Lublin. Nia rondo "Laboro" aranĝis sabaton la 2. jan. "esperantan vesperon". La programo estis: Prelego de k-do Halpern pri "Vivo kaj Verko de D-ro Zamenhof", de k-do Zavada "Esperantismo kaj socialismo", deklamoj, kantoj kaj prezentaĵo de komedio: "La renkonto" kiujn partoprenis la anoj de nia societo. Ĉeestis pli ol 200 personoj. Impreso ĉe la publiko, tute bona. Komenciĝis la enskribo por nova kurso speciale por fabriklaboristoj.

Tarnov. En daŭro de dec. p. j. funkciis en nia urbo esp. kurso en lab. hejmo. Gvidis la kurson k-do Lesiak, SAT-ano. 30 junaj laboristoj partoprenis diligente kaj jam ekposedis la lingvon tiome, ke ili komencas korespondadi. En ĉi-tieaj lab. rondoj ekzistas granda intereso por Esp. kaj estas preparataj pluaj kursoj. Intertempe oni organizis la esp. sekcion de Lab. Junulara Rondo kaj ĉe plua alfluo de laboristaj esp-istoj oni formos apartan lab. esp. organizaĵon.

Sovet-Unio

Ĉita. Aldone al artikolo "kiel ni vivis kaj laboris" en n-o 8(60) ni sciigas la jenon: En oktobro finis sian funkciadon "studrondeto" por novaj SAT-aniĝontaj k-doj. K-doj oficiale SAT-aniĝis kaj ekpartoprenis la ĝeneralan SAT-laboron. Nun la SAT-grupo enhavas jam 13 gek-dojn. Samtempe en oktobro ĉe la SAT-grupo estis organizitaj du sekcioj: traduka kaj pedagogia.

Pedagogia sekcio estis organizita, ĉar ĉirkaŭ 6 gesatanoj instruas ĉe diversaj esp.-kursoj. Tial ĉiudimanĉe antaŭ la SAT-kunsido estas "Pedagogia horo", dum kiuj la plej sperta, nia pedagogo k-do Bajenov instruas la aliajn al natura metodo de esp.-instruado.

Traduksekcio, enhavanta 4—5 gek-dojn, kolektiĝas laŭokaze. Tradukado por "Senn." kaj "S. R." estis iomete vigligita.

Ĝenerale, ĉe SAT-kunsidoj ni studis la kongresmaterialojn de la V. SAT-kongreso, ni studis historion kaj laboron de SAT-eldonkooperativo kaj de SAT-presorganoj. Rezulte estis akceptitaj kelke da praktikaj decidoj pri aĉeto de akcioj de Eldon-kooperativo, abono de "Biblioteko de "Sennaciulo", varbado de novaj abonantoj de "Senn." ktp., kaj akceptita rezolucio, enhavanta nian opinion pri SAT-presorganoj.

13. dec. 1925 ĉe lasta SAT-kunsido, post raporto pri internacia Lab.-presservo, estis decidite organizi interŝanĝon de porgazetaj artikoloj inter sovetiaj, ĉiniaj, japanaj kaj aliaj SAT-anoj, t. e. ion similan al ekstremorienta lab.-presservo.

Tiucele SAT-anoj de 12, 13, 14, 15, 21, 22, 29, 31 kaj aliaj sektoroj *estas petataj sendi artikolojn* (pri laborista vivo de iliaj landoj) *kaj siajn deziresprimojn* (kiaj temoj pri Sovetio pleje interesas ilin k. iliajn urbajn lab.-gazet.?) *laŭ adreso: Sibirio, Ĉita, Kamĉatskaja n-o 75 al K. Faddejev, SAT-ano n-o 3717.*

K. F.

Kiev (Ukrainio). En lernejo de fabriklaboristoj kaj komunloĝejo de fervojlaboristoj organiziĝis grupoj, kiuj studas la lingvon internacian. La grupoj estas gvidataj de k-do Poniŝevski. Gelernantoj estas varbataj por SAT.

De la nova jaro Esp. estas enkondukata en fervojaj laborlernejoj.

La loka Societo de Radio-amatoroj decidis interrilati kun eksterlandaj kamaradoj per Esp. Oni estas petataj korespondi laŭ adreso: Kiev, Instituto de Popola Mastrumado, al KODR (Kieva Societo de Radio-amatoroj).

Poniŝevski (5729)

Krivoj Rog. En la loka distrikta Soveta partilernejo estas organizita esp. rondeto kaj malfermita Esp.-kurso. La unua leciono okazis la 3. decembro. Gvidanto — k-do Mitrofarov.

Minsk. 15. dec. okazis solena kunsido de blankrusia C. O. SEU, minska distrikta komitato de SEU kaj minska SAT-anaro kaj SEU-anaro dediĉita al memoro de L. Zamenhof. Post parolado de k-do J. Klys, kiu diris, ke ni revoluciaj esperantistoj ne estas batalantoj por "esperantismo". Ni batalas por aliaj ismoj", salutis kunvenon nome de blinduloj k-dino Polak. K-do Kirjuŝin faris raporton pri "Zamenhof kaj esperanta laborista movado".

La "sankta jaro 1925"

(Impresoj de SAT-ano en Romo)

Petro Frapviando (920)

(Daŭrigo)

Kun pompa lukso — oro ne estas ŝparita — estas konstruata la tombo de "Sankta Petro". Ne estas mirinde, ke tia brila konstruaĵo estas adorata. Iom flanke staras metala statuo de la apostolo, montrante ĝin sidanta, la dekstran piedon iom antaŭmetinta. Sur alta piedestalo staras la statuo, tiel, ke la piedoj estas en alteco de la ŝultroj de mezgranda homo. Ĉar tiel estas oportune, oni kisas la dikan piedfingron — pli ĝuste: oni volas kisi ĝin, sed oni ne plu povas, ĉar ne nur la dika, sed ankaŭ ĉiuj aliaj piedfingroj kaj eĉ parto de la piedo mem jam tute estas forkisita! Do oni kisas la reston de la piedo. Nu, por cent jaroj ĝi eble ankoraŭ sufiĉas. Rigardante tian frenezaĵon, oni povas konvinkiĝi, ke la kristanoj ne estas kanibaloj. Ili ne agas kontraŭ la dia ordono: Ne faru al vi ian bildon de via "DIO". — Nur sovaĝaj popoloj adoras idolojn.

Trans ŝtuparoj kaj subteraj koridoroj oni venas en la ĉambron, kie staras la marmora ĉerko kun la kadavro de la lasta papo. Post pago de kelkaj liroj estas ekbruligata kandelo. La kontakto funkcias — oni povas paroli kun "sia papa moŝto", la kadavro. En momento, kiam la ĉerkĉambro estis senhoma (mi mem hazarde staris malantaŭ kolono en la malhelo) la kandelojn vendanta monaĥo aliris, estingis la plej longajn kandelojn, — "dediĉitajn" de piaj pilgrimantoj — kaj per preciza tranĉilo renovigis la bruligitan pinton. Tuj poste samaj kandeloj ankoraŭfoje estis bruligataj, post denova pago de aliaj, intertempe venintaj pilgrimantoj. — Profitdona negoco.

Je la pordo de ĉiu itala preĝejo pendas afiŝo en kvar lingvoj: "Por inoj en ne deca vestaĵo estas malpermesata la eniro!" kaj sekvas la priskribo de "deca, morala" vestaĵo: "Dece vestita ino portas ĉapelon." La manikoj devas kovri la tutan brakon, nur ĉe infanoj ili povas esti pli mallongaj. Same estas fiksita la longeco de la roboj laŭ la aĝo; la plej mallongaj roboj (nur permesataj al infanoj) devas esti almenaŭ ĝis sub la genuoj, pli aĝaj inoj tute devas kovri la tiel belan, sed bedaŭrinde "pekan" karnon. Tiamaniere multaj homoj neniam sciiĝos pri la fakto, ke ankaŭ la inoj havas krurojn. La kolo ne devas esti tro nuda. La ŝtofo de la vestaĵo ne devas esti diafana. — En la Vatikano mem eĉ estas ankoraŭ pli severe. Tie la eniro estas malpermesata eĉ por viraj personoj kun nudaj kolo aŭ genuoj. Migradulo kun la mallonga pantalono ekz. ne povas partopreni papan aŭdiencon, se li ne disponas pri "longa" pantalono kaj kolumo. La "svisa gardistaro" en la vestaĵo de mezepokaj soldatoj, laŭ papa ordono malpermesas la eniron en la vatikanan palacon.

Paginte kvin lirojn — fervoja pilgrimanto nur pagas la duonon — mi eniris la muzeon de la vatikano. Ĉi tie la paparo kun la tempo kunportis ĉiun pli valoran trovaĵon kaj elfosaĵon el la antikva tempo. Multajn belajn marmorajn statuojn kaj kolonojn la kristanismo en mezepoko detruis pro "kontraŭdiismo". El la marmoro estis bruligata kalko! — Hodiaŭ tiu prudentularo volas ŝajnigi "kultur-gardanton". Pro tio ili ne forgesis, meti antaŭ ĉiun "hontan parton", nude prezentitan de la antikvaj romanoj, gipsan legomfolion. Skrapante per la ungo je la statuo kaj je la "kovraĵo", mi konvinkiĝis, ke la lasta estas gipsa, do poste surŝmirita. Tiel la Vatikano ekspozas la antikvajn trovaĵojn falsite. La malgranda resto, kiu hazarde estis indulgita de la detru-furiozo dum la unua tempo de kristana regado, nun devas toleri falsigon de tiu sama eklezio, kiu bedaŭrinde ankoraŭ hodiaŭ regas. — Al homoj en ne deca vestaĵo estas malpermesata la eniro en la vatikanon, ĉi paragrafo validas ankaŭ por senviraj marmorskulptaĵoj.

(Daŭrigota)

Grandan paroladon havis profesoro de blankrusia regna universitato, blankrusia scienculo S. J. Volfson. Li parolis pri ekonomia bazo de Esperanto.

Poste unuamime estis akceptitaj jenaj proponoj: elekti k-don prof. S. Volfson, kiel honoran membron, de minska SEU-organizaĵo. 2. Sendi Salutleterojn al idea gvidanto de proletara esperanta movado en BSSR — al Centra Komitato de Blankrusia Kom. Partio; al CK SEU, al SAT, kaj al familio de Zamenhof.

Post kunsido estis aranĝita esperanta koncert-ĥoro, deklamado, sola kantado kaj Sporto (Sportuloj havis grandajn SAT-insignojn sur siaj brustoj).

Akurate aperas tradukoj el "*Sennaciulo*" kaj tradukoj el leteroj ricevitaj de l' oficejo de inter Laborista ligilo ĉe BCO de SEU en jenaj eldonoj:

"Profesia movado" ĵurnalo de Blankrusaj Profsindikatoj. Ĝi havas apartan "internacian" paĝon", kie ĝi presas ne nur leterojn sed ankaŭ fotojn kaj karikaturojn.

„Ruĝa Standardo" ĵurnalo de studentoj, Specialaj paĝoj "El eksterlando".

Vilaĝana gazeto "Blankrusia Vilaĝo" presas leterojn de vilaĝanoj kaj tradukojn el *Sennaciulo.*

"Ruĝarmeana Vero" — ruĝarmeana gazetoleteroj de ruĝarmeanoj.

Aliaj blankrusiaj gazetoj konsentis presi per esperanta materialo. Ni jam petis, ke ĉiulandaj SAT-anoj helpu nin en tiu afero.

Laboristoj, instruistoj, studentoj, Vilaĝanoj, scienculoj, naturistoj, fotografistoj — ne forgesu, ke nia peresperanta laboro — estas laboro por proletaro, por tutmonda revolucio. En n-o 5 de "Sennaciulo" (nuna jaro) vi trovos adresojn de gazetoj aŭ sendu senpere *Minsk poŝtkesto* 33 *Oficejo de Internacia Laborista Kunligo ĉe BCO SEU.*

Ĉiu SAT-ano memoru tiun adreson — transdonu ĝin al via parti-, laborist-junular- k. a. organizaĵoj. *Snejko.*

Ratiŝĉevo. En Sar.-gub. la 15. 12. 25 estis organizita kaj malfermita ĉe fervoja laborista klubo de Lenin esperanta rondeto kun 30 partoprenantoj. Klubregistaro abonis al "Internacia lingvo", organo de CKSEU (Sovetio) kaj al "Sennaciulo" por tuta jaro. La rondeton gvidas malnova tiea esperantisto P. Ĉerkiŝkov. *2769*

"Spartakiado"

Institucioj, gvidantaj sporton en Sovet-Unio, decidis aranĝi venontjare grandajn internaciajn konkurojn de l' lab-istaj sport-organizaĵoj — „Spartakiadon". "Spartakiado" okazos verŝajne en Kaŭkazo por plifaciligi partoprenon de sportistoj el Ĉinio, Hindio kaj aliaj orientaj landoj. *(1929)*

Sennacieca Asocio Tutmonda

*Asocia Sideĵo: 23 Rue Boyer, Paris-XX^e^*
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Komuniko de la Ekzekutiva Komisiono de SAT

Konforme al la statuto, la Direkta Komitato de SAT elektis sian novan Ekzekutiv-Komisionon; la rezulto de la baloto estas jena: ĝis nun 17 DK-anoj respondis, 2 ne respondis, — ĉiuj voĉdonantoj elektas gek-dojn Frida Noël, Banmer, Lanty, Glodeau kaj Roux, — k-do Migny estas elektita per 14 voĉoj kontraŭ 3.

En sia lasta cirkulero, EK demandis al la DK-anoj ilian opinion pri TLES kiu, male al la promesoj de siaj iniciatoroj, konkurencas aŭ celas konkurenci SAT-on. — Neniu DK-ano (kaj inter ili troviĝas reprezentantoj de ĉiuj tendencoj) aprobas tiun skisman entreprenon. La tuta DK alvokas ĉiujn sennaciulojn por plifortigi nian SAT-aparaton jam funkciantan, anstataŭ mispeni al formado de aparta asocio por ĉiu tendenco. En SAT, anarkistoj, sindikatistoj, komunistoj, socialistoj, nome ĉiuj revoluciuloj povas libere kaj pace kunvivi.

Antaŭ 10 monatoj, kiam k-do Migny prezentis ĉe la kunvenoj de EK sian projekton pri fondo de TLES, kaj petis ke SENNACIULO propagandu oficiale pri tiu entrepreno, tiam la ceteraj EK-anoj respondis, ke la SAT-aparato estas je la dispono de la SAT-anarkistoj, se ili volas labori frakcie samkiel jam faras la socialistoj kaj la komunistoj, sed ke komprenëble, la SAT-organoj ne devas reklami por kreo de konkurenca asocio, kiu frontiĝos nepre kun SAT sur la sama kampo. Cetere, la teksto de la TLES-statuto sufiĉis por pravigi la timon de la aliaj EK-anoj. Spite nian argumentadon, k-do Migny pretendis ĉiam, ke TLES ne celas konkurenci nian SAT; tamen, la faktoj pruvis la malon: *en sia organo, en sia programo, en sia agado, nenio estas favora al SAT.* Ni posedas dokumentojn, kiuj pruvas ke iuj TLES-anoj (eĉ el la gvidantoj) penadas incide ĉe la SAT-anoj por inciti tiujn al eksiĝo el SAT. — Fine ni citu la strangan farmanieron de kelkaj TLES-anoj en Lyon, kiuj, pro "malamo" al SAT, forŝiras la esperanto-propagandilojn kiujn la SAT-anoj gluis sur la muroj, kaj anstataŭloke skribas stultajn insultojn kontraŭ tiuj SAT-anoj.

— Oni memoras ankoraŭ ke, post la Wiena Kongreso, estis elektita en Leipzig, speciala Redakci-Komisiono, kies membroj apartenas al diversaj politik-tendencoj. La rolo de tiu organo estas solvi la konfliktojn kun la verkantoj; tiel esperëble, oni ne plu aŭdus krii pri diktatoremo de EK aŭ de la redaktoro. Tiu RK funkcias, sed jam depost 2 monatoj, ĉar la plimulto el siaj kolegoj ne akceptis ilian proponon, la 2 anarkistaj membroj eksiĝis. Ĉu tie ankaŭ kuŝus influo de TLES???

— Intertempe, k-do Migny eksiĝis el Ekzekutiva Komisiono. — La Direkta Komitato elektos anstataŭanton.

Paris, 5. januaro 1926



Germanlingvaj Prolet-esperantistoj!!

Propagandu por Esperanto kaj por SAT per nia flugfolio-afiŝeto (2. Eldono)

Mendu kaj uzu grandkvante por divastigi nian movadon!

Havebla ĉe k-do **H. Muravkin, Berlin-Halensee,** Küstriner Str. 8
Poŝtĉekkonto: E. Murawkin, Berlin 148098

* *

Prezo, inkluzive afranko en germ. mk. (antaŭa pago)

1000 ekz.,	Germ.,	Aŭstr.	13.20	aliaj landoj		17.10
500	„	„	6.80	„	„	8.60
100	„	„	1.50	„	„	1.75
10	„	„	0.17	„	„	0.22



Alvoko!

Al la kontraŭmilitarista junularo de ĉiuj landoj

Gekamaradoj!

Suprenomita junularo en Holando preparas sian 3. pentekostan-mobilizon. Jam dufoje ĝi organizis dum la du tagoj de pentekosto pasinta naciajn kunvenojn kontraŭ la milito.

Kuraĝiĝinte pro la sukceso ĝi decidis klopodi plilarĝigi la 3. pentekostanmobilizon kaj organizi grandiozan internacian kunvenon de la kontraŭmilitarista junularo.

Devizo: *Kontraŭ kapitalismo kaj milito.*
Kontraŭ ĉiuj formoj de militarismo.

Ni invitas la junularon de Belgio, Germanio, Anglio, Francio, Svisio kaj ĉiuj aliaj landoj, sendi al ni signojn de simpatio kaj ankaŭ sendi al ni sciigojn pri eventuala partopreno. Loĝado kaj partopreno estos tute senpagaj.

Nur restas al vi la vojaĝkostoj pri kiuj ni povos fari aranĝon.

Pli detalaj komunikoj pri loko k. t. p. sekvos. Tuj aliĝu kaj sendu viajn komunikojn al la eksterlanda korespondanto de la 3. internacia "Pentekosta mobilizo".

George Oversteegen, Santpoort 50, Holando.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG